


Núm. 4
ABRIL 1949
Ruzafa, 7
VALENCIA
(ESPAÑA)

# EL INGLES Y EL ESPERANTO

**Muchas personas creen, sobre todo después de la última guerra, que el problema del idioma internacional está resuelto con la adopción del inglés. La mayor parte de los que así** ***opinan*** **se fundan en el hecho de que muchos cientos de millones de seres hablan ese idioma, del que no se apearían, y en la consabida sencillez de la gramática inglesa, que haría más fácil su aprendizaje para los que lo adoptasen.**

**Como no se debe vivir de ilusiones, y esa creencia se basa en hechos y estadísticas muy discutibles, la deducción es, con mucho, de las más ilusorias. Y no es que creamos que el inglés nos disputa el terreno vital que el Esperanto necesita, no.**

**Creemos que toda persona culta debe, en los países hispánicos, conocer el francés y el inglés.**

**El primero, por su enorme aporte al acervo literario y su indudable utilidad para estudiar técnicas y novedades científicas, todo ello favorecido por una relativa facilidad para los conocedores de un idioma de la familia latina.**

**El segundo, por su importancia comercial, aumentada, después de la guerra, por una supremacía política, sin despreciar su contribución literaria.**

**El conocimiento de estos idiomas no debe dar la sensación de haber llegado a la cumbre del poliglotismo, pues, aparte de que aún quedarían en el mundo cerca de dos tercios de habitantes sin posibilidad de comprensión para esos idiomas, hay que contar con que, muchos de los colocados por las estadísticas entre los de habla inglesa, no lo son ni por asomo. Así, por ejemplo, en la inmensa península indostánica, poblada por más de 300.000.000 de habitantes, sólo una minoría ínfima—intelectuales, comerciantes de altura, habitantes de las costas—habla inglés. La inmensa mayoría de los habitantes, o no lo habla o destroza unas docenas de vocablos, y eso no es hablar un idioma. Además, el nacionalismo furibundo, tanto en la India como en Egipto y otros países con anglofobia, acentúa la tendencia a prescindir del inglés; hasta en Suráfrica se reactiva esa tendencia. En Irlanda son cada vez más numerosos los periódicos que se editan en irlandés, pese a su arcaicidad.**

**A pesar de todo lo dicho, hemos de convenir en que hoy por hoy, el inglés cuenta con una enorme masa de cultivadores, siendo actualmente Norteamérica quien más lo difunde y propaga, por su pujante poderío político, militar, comercial y, por ende, literario.**

**Pero eso no quita para que aquellos que no lo hablan por nacimiento encuentren dificultades insuperables para «poseerlo», esto es, dominarlo. La pronunciación, los giros, la multiplicidad de cosas que se pueden expresar mediante una palabra, y por el contrario, la multiplicidad de palabras con que se puede expresar una cosa, y lo que es peor: el significado absolutamente desconocido de frases cuyas palabras tienen un significado conocido, hacen del inglés un idioma que parece a primera vista más fácil que otros, pero que, en realidad, ofrece a todo el que lo estudia un ejemplo de lo que es el espejismo, meta que se vislumbra, pero que cada vez está más lejos e inasequible.**

**No hay que olvidar lo que en cierta ocasión aseguró un profesor universitario inglés: «Nuestra juventud lleva, a causa de la dificultad del conocimiento de nuestro idioma, un año de retraso cultural con respecto a los franceses». ¿Qué será, pues, de los que no lo conocen desde la cuna?**

**Si un idioma auxiliar universal tiene que ser, lógicamente, de fácil logro para las masas, es obvio que el inglés no puede ser tal; la mejor prueba está en los esfuerzos de muchos lingüistas sajones en simplificarlo, reformarlo y hacerlo más asequible; hasta ahora, ese objetivo no ha sido logrado, siendo la última intentona fracasada la del «Basic English», que es a diario ridiculizada... por los mismos ingleses.**

**Un idioma internacional perfecto, debe ser: sencillo, eufónico y neutral; que pueda servir para expresar con exacta concisión el lenguaje científico y con florida eufonía las vibraciones poéticas; que sirva para discutir con calor una diferencia de criterio en una sesión de congreso internacional, y hasta pasar de la discusión a la disputa. Con todas esas condiciones, acabamos de poner la definición delante de la palabra, pues todas esas cualidades de sencillez, eufonía y neutralismo las ofrece cumplidamente el Esperanto, la genial creación de Zamenhof.**

## NOVA MODELO DE RESPOND-KUPONO

Jam atingis nin unu respond-kupono laŭ nova modelo. La kliŝo restis la sama, la antaŭa flanko neniel estas ŝanĝita; la teksto estas en la landa lingvo kaj la franca. Sed la dorsa flanko faras iom pli nekutiman impreson. Ne plu oni trovas tie, kiel ĉe la malnovaj modeloj, la germanan lingvon. Sed, anstataŭe, oni vidas, krom la angla kaj hispana, signojn arabajn, ĉinajn ideografiojn kaj kirilajn literojn. Certe, la ŝanĝo okazis laŭ decido de la tutmonda Poŝtkongreso en Parizo 1947, kiu anstataŭigis la germanan per la rusa lingvo kaj nove enkondukis ankaŭ la araban kaj ĉinan, kiel lingvojn oficiale uzatajn de la Internacia Poŝta Uunio.

Antaŭ la nova aspekto de la respondkuponoj, ni, esperantistoj, trafe povas argumenti, ĉar la novaj kuponoj multe pli efike ol la malnovaj evidentigas la lingvan kaoson en la mondo, pruvante unu fojon pli, ke mondhelplingvo estas urĝe necesa. Ni nur miras, kial oni ne aldonis ankaŭ la hindan lingvon, kiu estas interkomprenilo por kelkcent milionoj da homoj. Oni povas vidi ja, ke la logiko ne estas signo de la nuna tempo sur la kampo de la lingvoj. Pri tio la esperantistoj estas forte konvinkitaj.

(Resume mallongigita el *Heroldo de Esperanto*)

---

La Skandinava Aerlinia Sistemo estas gravega entrepreno, kiu komencis uzi Esperanton en sia propagando kaj en la servado al siaj pasaĝeroj. Ekzemplo pri tio estas la ĵus eldonita broŝuro, kiu estas unu el la plej belaj tiaspecaj eldonaĵoj ĝis nun presitaj en nia lingvo. La preso estas klara kaj la multaj bildoj estas tre delikataj. Ĝi estas bonega propagando ne nur por la entrepreno sed ankaŭ por ni. Tial ni rekomendas, ke oni skribu petante tiun broŝuron al jena adreso: Skandinava Aerlinia Sistemo, Reklama Oficejo, Store Kongensgade 29, Kopenhago K.

**Danlando (Dinamarca).**

## HELSINGÖR

Este es el nombre de una hermosa ciudad danesa, situada cerca de Kopenhague, al borde del mar, y a la vista de la costa sueca. En sus alrededores, poblados de imponentes hayas, y cerca de la playa, se encuentra un magnífico hotel rodeado de hermosos parques. En él, la Liga Esperantista Danesa organiza, varias veces cada año, cursos de Esperanto para daneses y extranjeros.

A cada uno de ellos asisten cerca de 200 alumnos de todas partes del mundo que, en ambiente absolutamente internacional, desde por la mañana hasta por la noche, oyen, hablan, se ejercitan, juegan, pasean y giran por los atractivos alrededores, siempre en y por el Esperanto. Si alguno de nuestros lectores dispone de coronas danesas, pasaporte y tiempo libre, no tiene más que escribir a esta dirección: Sr.º L. Friis. Ingemannsvej, 9, Aabiböj (Dinamarca), y recibirá informes y tarjeta de cursillista.

¡Ah! ¡Quién tuviera los dos primeros requisitos!

Porque el tercero, con seguridad, que ya nos lo buscaríamos. ¿Verdad?

---

### TIE-CI... KAJ ALILOKE

Hispana proverbo sentence diras: Cie, fabojn oni kuiras!

Mi rememoras ĝin, pensante kiom da epitetoj al hispanoj estas diritaj pri tiu nia malvigleco kaj malrapideco. Pri hispanaj esperantistoj, mi ne povas aserti aŭ pretendi, ke ili ĉiuj estas decaj korespondantoj; mi ne defendas ilin. Sed tio, kion mi deziras esprimi, estas: ke, eble, la hispanoj ĉiam ne respondas al la samideanoj kies skribaĵojn ili ricevis; ke, eble, la hispanoj ne ĉiam plenumas la unuan devon de korespondanto: «ĉiu anoncanto morale devigas sin respondi minimume unu fojon al ĉiu, kiu skribas». Jes, ĉiu anoncinto havas la devon respondi...

Tamen, tia neserioza agmaniero ne estas unika ĉe latinidoj; bedaŭrinde, tio okazas; ĉie eĉ ĉe la plej gravaj kaj seriozaj —laŭ oni diras— popoloj. Pro tio: «Cie fabojn oni kuiras».

E. HURTADO

# KREANTOJ DE LA LINGVO

**Ni kontentigas deziron de la Legema Koboldeto represante la finan fragmenton de originala verko de Petro Stojan, kiu aperis felietone en la lastaj numeroj de nia kolego "Nederlanda Esperantisto"**

Nun ni bone notu, ke ĉiu novaĵo en la lingvo estas kreata individue, per ago de izola persono; nur poste la kolektiva uzado ĝin elprovas, forlasas aŭ adoptas. Kaj fine —post la praktika adopto— estas por ni indiferente, ĉu kaj kiam iu institucio bonvolos ĝin enregistri en siaj dokumentoj, meti sur ĝin la stampon «permesita», «aprobita» aŭ «oficiala». Tiaj formalaĵoj ne gravas por la vivo.

En tina resumo, do ni vidas, ke la vivportantoj de la lingva progreso estas apartaj individuoj,—talentaj poetoj, lertaj verkantoj, spritaj babilantoj, eĉ instinktoriĉaj infanoj, kiuj meritas nian dankemon, amon kaj protekton. Ne malhelpi ilin, ne minaci ilin per dikaj gramatikoj, —sed kuraĝigi ilin en ilia krea agado ni devas. Do, la progresema parto de la esperantistaro laŭte diru al ili: vivigu la lingvon, libere uzu ĝin laŭ via gusto, kreu sentime mil novaĵojn, kaj ni imitos vin en viaj trafaj elpensoj! Car entute, *via instinkto ne eraras*, ĝi amas la ĝojojn de kreado, kaj tio garantias al ni la bonegecon de la produktoj. *Akbar la Granda* proponis al filozofo desegnitan linion, dirante: malgrandigu ĝin, sed nenion detruante, nenion tuŝante en ĝi. Kaj la filozofo desegnis super la unua linio la duan, pli longan! Simila estas la tasko de niaj amikoj. Ili ne tuŝos al dikaj oficialaj volumoj, nek al centmembraj akademioj... Ili ne volas tuŝi tiun grandan ŝanceliĝantan turon—sed apud ĝi ili konstruos ion pli altan: la vivantan templon de la homara lingvo. Ni lasu ilin konstrui, ni apogu kaj estimu ilian fervoron; jam sole tio povus justigi nin en la okuloj de venonta generacio. Sed feliĉa estas, kiu mem povas partopreni kaj alporti sian ŝtonon al la kolektiva laboro. Car la plej granda feliĉo estas en la ĝoja kreado.

Ne ĉiuj povas veni al internacia kongreso aŭ renkontiĝi kun parolantaj samideanoj. Sed ĉiu havas la eblecon korespondi, legi, traduki kaj verki. Kaj tion faras la plimulto. Kio estus gazeto sen legantoj—eldonisto sen aĉetantoj? Kio fariĝus novuloj, se ili ne trovus bonvolajn korespondantojn? Kiel ekzistus niaj gazetoj, ne riĉaj por pagi kunlaborantojn, se ne ekzistus sinoferaj tradukantoj kaj verkantoj?

En ili ĉiuj estas kaŝita la ĉefa forto de nia lingvo. Per ilia senbrua laboro kreskas Esperanto, treege malrapide, sed certe, kiel fariĝas rokoj kaj koralaj insuloj en la mara fundo. Je unu presita artikolo estis cent rifuzitaj. Je ĉiu rifuzita manuskripto, resendata de la redakcio, estas dek, cent aliaj, ne senditaj, kaj eble neniam sendotaj. Neeblas imagi al si la tutan cerban laboron, kiu fariĝas ĉiumomente en Esperantujo. Oni preskaŭ ne konas ĝin kaj ĝi tamen estas granda kaj forta kiel montaro. Dum la solenoj, festoj, kongresoj, oni multe bruas, komplimentas, laŭdas kaj laŭras —tamen tio estas nur saŭmo sur la mara suprajo, kiu diras pri la energia ondado, sed ĝi mem ne estas tia.

Komencante de novuloj, kiuj unuafoje silabas frazerojn en Esperanto, pasante tra lernintaj adeptoj, ni alvenas al elito, koro kaj cerbo de Esperantujo, al fortaj poetoj, esperanto-majstroj. Tiel ni supreniras de la bazo de piramido ĝis la pinto, el kiu nia penso povus ĉirkaŭrigardi la tutan konstruaĵon.

En la realo tiu granda amikaro ne staras senmova, sed ĉiumomente moviĝas, kiel grandioza fontano, kies akvogarbo konservas sian formon, sed kies flua substanco ĉiumomente renoviĝas: unuj gutoj falas, dum aliaj suprenkuras, ilin anstataŭante. Kie nun estas la unuaj miloj da pioniroj, kiuj formis la lingvon antaŭ kvardek jaroj? Preskaŭ neniu el ili restis! — Sed la fluanta piramido daŭre funkcias, en proksimume sama cikla irado.

De temp-al-tempo, tiu aŭ alia teoriulo volas devojiĝi laŭ sia plaĉo tiun moviĝantan amason, kiu kun infana obeemo sekvas la trudatan vojon, dum unuaj paŝoj, sed poste haltas, lasante la teoriulon plu kuri sola, dum la amaso reprenas malnovan direkton, diktatan de la instinkto senerara.

# INTER LA PROZO DE LA

Kun la bona intenco plenumi la promeson, kiun mi faris en mia lasta babilado, prezenti al vi la paradon de plej multe da titoloj, zorge mi serĉis kaj funde mi legis amason da freŝdataj gazetoj. Kuŝas antaŭ mi dika staplo, tre riĉa kolekto, kies elmontro estus ja trafa argumento por skeptika homo. Jes, bedaŭrinda, tre bedaŭrinda estas la fakto, ke nur malmultaj amikoj havas nun la ŝancon povi rekte vidi kaj legi tiel ŝatindan materialon, ĉar ili per tio firme konvinkiĝus, ke nia afero marŝas antaŭen progresante de tago al tago. La interna forto de nia movado, hardita sur la amboso de kruelaj cirkonstancoj, montriĝas tra la paĝoj de nia gazetaro, kie seriozaj artikoloj ne hezitas doni opinion kaj eĉ proponi solvon pri la plej tiklaj demandoj de la nuna tempo. Hodiaŭ mi volas turni vian atenton al tiuj karaj kolegoj, kiujn aperigas la landaj asocioj : Jen unue la renovigita SVISA ESPERO kun kovriloj garnitaj per artaj anoncoj de gravaj firmoj, kiuj pro tio mem, ke ili ne estas esperantistaj, donas kvaliton al nia afero ; kvazaŭ gaja standardo, flirtanta super la altaj montegoj de tiu simpatia lando de famaj horloĝoj, ĝi klarigas en ĉefartikolo siajn aspirojn fariĝi akurata informilo en la koro de Eŭropo. BELGA ESPERANTISTO vokas ĉiujn al la nacia kongreso en Bruĝo dum la proksima Pentekosto ; estas interesa la mencio al numero de tiu sama gazeto, aperinta jam antaŭ kvardek jaroj, kie speguliĝis la tiamaj okazintaĵoj. Sekvas impona kolego NEDERLANDA ESPERANTISTO, frukto de amika kunfandiĝo de iama organo de neŭtrala unuiĝo «La Estonto estas nia» kun «Flandra Esperantisto». Largajn kolonojn oni dediĉas tie sub rubriko «La Studanto» por la lingva perfektiĝado de la legantoj. Krom tio, artikoloj kun studinda enhavo aperas apud spritaj versetoj aŭ bonhumoraj rakontoj. Bonega kaj nepre leginda estas la felietono «Deveno kaj Vivo de Esperanto». Jen, mi prenis fragmenton, kiun mi zorgos aperigi aparte en tiu ĉi sama numero de nia bulteno. Oni varme vokas ankaŭ al la nacia kongreso en Haarlem, meze de la kuranta Aprila monato. La entuziasmo de niaj nederlandaj samideanoj, kaj la brila florado de nia lingvo en la ĉarma lando de la tulipoj kaj ventomuelilioj, permesas antaŭdiri sen risko je eraro, ke la renkontiĝo estos ege plensukcesa ; cetere, la kongresurbo per si mem estas adekvata kadro por tiu solenaĵo. Tute prave Haarlem estas nomata la florurbo, pri tio mi povas atesti persone, ĉar ankoraŭ daŭras ĉe mi la emocio de feliĉaj tagoj, kiujn mi pasigis en la palaceto de bonegaj gnomoj, gefratetoj miaj, ĉe la tiea Cikonio-strato... Nu, mi devas forlasi privatajn sentimentalaĵojn kaj daŭrigi la fantazian vojaĝon laŭ la sinsekva vico de la esperantistaj presaĵoj. DANSK ESPERANTO-BLAD informas pri la dana movado ; plej grava estas la raporto pri la filmo «Danlando» de kiu la ministerio de eksteraj aferoj mendis eldonojn en pluraj lingvoj, el kiuj Esperanto certe estos, kiu faros pli longan vojaĝon. De Marto ĝis Junio la filmo estos en Italio, kie la «Itala Esperanto-Federacio» aranĝas, kunlabore kun la itala turisma oficejo kaj aliaj organizoj, tutlandan cirkuladon. Verŝajne, la filmo estos montrata en la Foiro de Milano,

**Se nia epoko, lulata de l' zumado de motoroj, at esperantistaro devas agi konsekvence, ne nur s konkordo kaj amo, sed efike montrante la pozitiv utopio nek ia nebula idealo envolvita en miste interne mem de homa svarmo, la esperantismo e regno senlima, kie neniam la suno subiras, nia potenca rimedo je la servo de konkreta bezono, s ke unu homo komprenu la alian... Jen do nia glor montri, kiun ni devas uzi dum firma strebado po malpli nobla, de impona tekniko, kiu t dinamo, por saluti l**

## PERANTISTA GAZETARO

kie ĝi vekos taŭgan intereson por Esperanto. La hispanaj amikoj devas sciadi ke ĉi tie ankaŭ oni faris demarŝojn por ricevi la viziton de «Danlando» sed ankoraŭ oni ne povas certigi ĉu la rezultato estos sukcesa. NORVEGA ESPERANTISTO dediĉas la frontan paĝon por ampleksa artikolo pri Esperanto kiel gepatra lingvo; tie oni rakontas pri la diversaj provoj paroli nur en Esperanto al la infanoj, kiuj ankoraŭ ne lernis paroli; preskaŭ ĉiam la rezultato estis kontentiga; la artikolo jene finiĝas: «De tempo al tempo ni aŭdas, ke Esperanto estas edzperanto; espereble en tiuj esperantaj familioj fariĝis ankaŭ esperantaj infanoj». Enviinda estas la luksa papero de «SVENSKA ESPERANTO TIDNINGEN» organo de la sveda asocio. Tie oni ankaŭ raportas pri la penoj enkonduki Esperanton en grava lernejo de Göteborg; inter alio oni diras: «Oni ne povas logi lernantojn al dumvesperaj lecionoj, se tiuj ĉi ne enhavas ion amuzan, plezuran. Tiun plezuron povas doni agrablaj okupoj dum la studhoroj, krom kelkaj aldonaj aranĝoj inter tiuj, kiuj partoprenas la lecionojn. Tiaj aranĝoj povas esti ludfestoj, kiuj altiras knabinojn, kaj konkursoj de pilkludoj, kiuj allogas la knabojn». Tre atentinda estas la celado al praktika uzo de la lingvo en grava projekto, kiun kolektive aranĝis ĉiuj Esperanto-organizoj de Svedio; mi ĉerpas kelkajn fragmentojn: «La praktika uzo de nia lingvo estas ĝenerala deziro inter la esperantistaro. Kaj la efektivigo de tiu deziro estas la plej urĝa, kiun ni nun havas. Inter la esperantistoj regas ĉiam arda deziro havi scion pri la sociaj problemoj en aliaj landoj. La Sveda Laborista Kleriga Asocio kutimas ĉiun jaron aranĝi internaciajn instrukciajn kursojn por perfektigi la stud-gvidantojn en diversaj temoj. En tiuj kursoj estas uzata la angla, kiel instrua lingvo. Nun ni petis, ke tiu Kleriga Asocio kune kun nia Esperanto-Instituto aranĝu vere internacian kurson, en kiu Esperanto estu la oficiala kaj sola lingvo. Kun ĝojo ni povas sciigi, ke la dirita Asocio nun akceptis jam nian proponon. Dependas de ni, esperantistoj, ĉu ni povos efektivigi la planon. La kurso okazos de 26 Junio ĝis 10 Julio, kun kvar unuhoraj prelegoj ĉiutage. La kosto kun manĝo kaj ĉambro estas 90 svedaj kronoj. Jes, tio certe estos bona, vi pensas, sed kiel havigi monon por la partoprenontoj el malproksimaj landoj? Ni esperantistoj ĉiam luktas kun malfacilaj ekonomiaj problemoj; tamen, jen la solvo: Ni sendos peton al ĉiu sveda sindikata federacio kaj ceteraj fakaj organizoj petante, ke tiuj pagu por unu eksterlanda samprofesiano la vojaĝon kaj restadkostojn en Svedio. La partoprenontoj povas ankaŭ peti subtenon al la fakasocio de sia propra lando ĝis la sveda limo. Tiel ni jungos la menciitajn organizojn antaŭ nia esperantista ĉaro, kaj samtempe ni havos okazon montri, ke nia lingvo taŭgas en internacia praktiko». Kaj per la polurita broĉo de tiu brava alpaŝo de niaj svedaj samideanoj mi fermas la programon de mia interveno. Sed ankoraŭ mi devas legi plurajn legaĵojn, ilin mi gardos por la venonta numero; kun plej alta estimo restas via.

LA LEGEMA KOBOLDETO

**la utilan flankon de la aferoj, la moderna**
**la flagon de sia morala kaj bela celado al**
**ıton de sia praktika laboro. Esperanto ne estas**
**ıte ne! Tra la vasta spaco de la tuta mondo,**
**ıga forte kaj fakte treege atentinda. En tiu sia**
**progresas kaj floras, kiel simpla kaj tamen**
**mem grandioza, kvankam tiel natura, kiel tiu**
**fo! jen do nia vero sen trompo! kiun ni devas**
**ordon en alta konkuro, apud la konkuro, ne ja**
**ton el ritma zumado de motor' kaj**
**de la epoko nia!**

# FACETAS DEL MOVIMIENTO ESPERANTISTA

● FINLANDIA.—Desde el comienzo del corriente curso. en la escuela de la ciudad de Somero, se enseña el Esperanto, como asignatura obligatoria, dos veces cada semana, durante 45 minutos.

● TRIESTE.—También en este territorio, con mandato internacional, aumenta el número de los esperantistas. Bajo el título «La Espero», se publica un folleto mensual con interesantes artículos. La dirección de la Sociedad local es la siguiente: Corso G. Garibaldi, 2. Trieste.

● HOLANDA.—En Eindhoven, ha tenido lugar la primera emisión de una lección de Esperanto por televisión, hecha por la estación de la Philips.

El número de esperantistas en los Países Bajos es imponente. Los directores del movimiento esperantista han instigado a los Ayuntamientos para que soliciten del Ministro de Insrucción que el esudio del Esperanto sea obligatorio en las escuelas primarias. Hasta ahora, 108 Ayuntamientos lo han hecho positivamente, y se espera que el número de concejos triplique.

Con este motivo, el Dr. C. Kleiwegt, Inspector Jefe de Escuelas Normales, escribe: «En mi opinión, la activación del estudio del Esperanto en las Normales merece el apoyo de todos. Sin considerar si la instrucción sea o no obligatoria, creo que se hará bien disponiendo de cierto tiempo en las Normales para ese objeto.

● FRANCIA.—El Boletín mensual de la Sociedad Entomológica de Mulhouse (Alsacia), usa el Esperanto para sus relaciones con el extranjero, y publica resumen de todos sus artículos en nuestro idioma internacional. Número de muestra obtiénese dirigiéndose al corresponsal de la revista Sr. A Lienhardt. 21 faubourg de Riedisheim, Mulhouse (Francia).

En París, y bajo los auspicios del Sr. Charles Levin, jefe de propaganda de la Feria de Lyon, se ha fundado la «Esperantista Komerca Chambro». Su objetivo consiste en reunir en ella a todos los comerciantes esperantistas, relacionarlos y propagar el uso del Esperanto para las relaciones comerciales internacionales. Su dirección es: 55, Avenue Felix Faure, Lyon (Francia).

● INGLATERRA.—El Consejo Municipal de Bournemouth, la famosa perla costera, en donde se celebrará este año el 34.º Congreso Internacional de U. E. A., ha editado un bonito prospecto en Esperanto, con un plano de la ciudad. Numerosos empleados municipales, policías, empleados del tráfico, etc., están aprendiendo la lengua universal para ponerse en condiciones de eficiencia para dicho acontecimiento. El segundo alcalde y varios altos empleados siguen los cursos.

Actualmente son cerca de 250 los alumnos que se están instruyendo.

En la famosa Universidad de Cambridge acaba de constituirse la «Sociedad Universitaria Esperantista» compuesta únicamente de alumnos de la misma. Como puede apreciarse, no es en Inglaterra donde el Esperanto cuenta con menos simpatías entre las clases intelectuales.

● BRASIL.—El diario matinal «A República», de Natal, publica desde Junio pasado un artículo semanal bajo el título «Esperanto y Esperantismo». Con ello, se pone un jalón más en el progreso que el Esperanto va llevando en la importante nación brasileña.

● ALEMANIA.—Este país, en el que, antes de la subida de Hitler al poder, el esperantismo tenía un brillante desarrollo, vuelve a ocupar un lugar preeminente entre los más fervorosos de la lengua de Zamenhof. Ya que su bajo nivel económico no le permite relacionarse brillantemente con el extranjero, procura tener una vida esperantista interna, pero intensa. En centenares de ciudades se organizan cursos, y el próximo Congreso de la Germana Esperanto-Asocio, que se celebrará en Göttingen en el próximo Junio, promete ser un éxito clamoroso, superior al logrado en Munich durante el pasado año, y al que asistieron unos dos mil congresistas, a pesar de las dificultades monetarias y legales dictadas por los ocupantes.

● AUSTRIA.—La Administración de Correos de este país va a lanzar una serie de sellos redactados en Esperanto. En ello se ve la mano del Director General, Dr. K. Dworschak, esperantista eminente.

● SUIZA.—En el simpático país cuatrilingüe también se va desarrollando el movimiento esperantista, y, públicamente, se multiplican los comercios en los que se lee «Oni parolas Esperanton»; y entre ellos, destaca, en Zürich, un bar, en el que se puede leer regularmente el «Heroldo».

● JAPON.—En aquel lejano país, donde antes de la guerra había un magnífico movimiento esperantista, vuelve a adquirir una enorme pujanza,, habiéndose constituido grupos en todas las ciudades importantes.

● LA PETSKRIBO.—La famosa petición a la O. N. U. para la instauración del Esperanto aumenta vertiginosamente, a pesar de las dificultades económicas que impiden la debida propaganda. En nuestro último número del «Boletín», mencionamos la cifra de 13.000.000, que considerábamos muy considerable y digna de ser tenida en cuenta. Pues bien, este mes, la estadística ha dado un brinco formidable, pues pasa ya a más de 15.000.000.

En ella destacan en cabeza: Alemania, con cerca de 7 millones; Japón, con casi dos millones; Checoslovaquia, con un millón; Holanda, con un millón; Gran Bretaña, con cerca del millón, y Noruega, con medio millón.

Estas halagadoras cifras nos indican que las minorías que desean el triunfo del Esperanto no son despreciables, y que la O. N. U. tendrá que admitir nuestra petición, no como aspiración de un puñado de ilusos, sino como deseo de importantes y destacados sectores de opinión en todo el mundo., para que el Esperanto ocupe, lógicamente, el lugar que le corresponde como instrumento de cultura.

---

# AL ĈIU HISPANA KURACISTO

Nia profesio tiom progresadas, ke estas necesa la interrilato inter kolegoj de la tuta mondo, ĉu per skribado, ĉu per telefono, ĉu per vizito al fremda lando.

Kiel tio estas ebla? La granda nombro da lingvoj parolataj neebligas la interkomprenon inter ni, malgraŭ tio ke la plimulto el kuracistoj lernas, post longa peno kaj granda elspezo, unu aŭ du pli fremdajn lingvojn, kiuj multfoje por nenio taŭgas.

Por eviti la perdon de tempo kaj mono, estas necese uzi facilan lingvon, per kiu atingi la unuiĝon de la diverslandaj kuracistoj, kaj nuntempe nur Esperanto, se facila por ĉiuj homoj, ankoraŭ pli por la instruitaj kuracistoj, povas plenumi tiun deziron.

Jam delonge, multaj esperantaj medicinaj gazetoj celis la interrilaton kaj komprenon inter la tutmondaj kolegoj, kaj en diversaj landoj okazis medicinaj kongresoj, sed la pasinta tutmonda milito ĉion ĉesigis, kaj la kuracista esperantistaro restas disigita ne havante gazeton por sia celo, ĉar la monaj malfacilaĵoj ne permesas momente publikigi ĝin.

La senĉesa laborado de nia kolego Dro. R. Herrero donis frukton, kaj de antaŭ kelkaj monatoj oni starigis H. E. K. A. (Hispana Esperanta Kuracista Asocio); ĉiusemajne, lundon kaj ĵaŭdon, je la sepa vespere, oni klarigas kurson por kuracistoj kaj medicinstudentoj en la Valencia Kuracista Kolegio.

Antaŭen do, ni malkuraĝiĝu neniel pro la malfacilaĵoj, kaj tial ke ni jam disĵetis la semon ni laboru senĉese, kaj nepre ni sukcesos!

Jen nia tasko. Unue esperantigi la plimulton el la kuracistoj kaj poste, kial ne?, publikigi Medicinan Revuon. Ni ne ektimu pro la baroj. Ni rememoru ke... eĉ guto malgranda, konstante frapante, traboras la monton granitan.

E. TUDELA

---

**¡El Esperanto es un amplio ventanal abierto al mundo!**

## *Libros recibidos*

**Curso práctico de Esperanto por Ferenc Szilagyi. Editado por «The Esperanto Publishing Co. Ltd. En rústica, 99 páginas, 2 chelines, 8 peniques (11 rpk.).**

Esta admirable obrita del competente esperantista húngaro, Dr. Szilagyi, tendrá una excelente acogida en los países de habla española, a los que está destinada la edición castellana. En España y en Suramérica se viene notando ya la falta de libros de texto, y el «Curso Práctico» del doctor Szilagyi viene a aliviar este importante problema. Aun cuando se ha escrito sin más pretensión que servir de texto elemental, la verdad es que el objetivo del autor ha sido ampliamente rebasado, por cuanto la obra contiene una muy completa gramática, ilustrada con profusión de ejemplos y acertadas viñetas, cuyo estudio es suficiente para adquirir un notable dominio del idioma de Zamenhof.

No es el menor de los méritos que adornan este libro, el cuidadoso desarrollo de la parte gramatical, con arreglo a los más exigentes postulados didácticos, y tratado con una delicada y amena sencillez por la pluma maestra del eminente samideano húngaro.

Felicitemos finalmente a la Editorial por la excelente presentación del libro, impreso en claros tipos sobre buen papel, y, especialmente, por el correcto estilo de la traducción española. ETULO

---

## RICEVITAJ GAZETOJ

Danke ni kvitancas la ricevon de la sekvantaj gazetoj:

**Heroldo de Esperanto**
**La Praktiko**
**Esperanto**
**Monda Tribuno**
**Sennaciulo**
**Malgranda Revuo**
**Scienca Revuo**
**Svisa Espero**
**Belga Esperantisto**
**Nederlanda Esperantisto**
**Dansk Esperanto-Blad**
**Norvega Esperantisto**
**Svenska Esperanto Tidningen**





---

La mejor manera de favorecer al Esperanto en España es inscribiéndose en HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO

| | | |
|---|---|---|
| Socio de número ... | 13 ptas. | anuales |
| Socio abonado.. ... | 25 » | » |
| Socio protector... ... | 50 » | » |

Las dos últimas categorías dan derecho a la recepción de nuestro «Boletín».

---

Pri administrado kaj redakciaj aferoj de nia BULTENO, adresu ĉion al: HISPANA ESPERANTO FEDERACIO Ruzafa, 7 — VALENCIA (Hispanio).

---

AMIKO HEF-ANO! Skribu al ni, diru al ni senhezite tion, kio al vi plaĉas en via bulteno. Nepre ni bezonas viajn sugestojn kaj viajn instigojn, por ke nia laboro estu ŝatata de ĉiuj.

## NEKROLOGO

**Pasintan monaton mortis la patro de nia tre kara samideano F. Rivelles, vicprezidanto de Hispana Esperanto-Federacio. Ni sincere esprimas nian kondolencon kaj funde komprenas la doloron, kiu nun premas la koron de nia bona amiko, fervora samideano kaj meritoplena gvidanto de nia organizo.**